

N. N. 32,  
En rose så jeg skyde

*tradukita de Thomas Laub*

En rose så jeg skyde  
op af den frosne jord,  
alt som os forдум spåde  
profetens trøsteord.  
Den rose spired frem  
midt i den kolde vinter  
om nat ved Bethlehem.

For rosen nu jeg kvæder  
omkap med Himlens hær:  
en jomfru var hans moder,  
Maria ren og skær.  
I ham brød lyset frem  
midt i den mørke vinter  
om nat ved Bethlehem.

Den rose fin og lille  
har dejlig duft og skær,  
den lyse for os ville  
og sprede mørket her.  
I sandhed mand og Gud,  
af syndens nød og pine  
han nådig hjalp os ud.

N. N. 32,  
Jen ĉiamviva Rozo

*tradukita de Leland Bryant Ross*

Jen ĉiamviva Rozo  
laŭ vorto de profet'  
El la Jišaja ŝoso  
ekkreskis kun impet'.  
Ĝi venis, hela Flor',  
en frida tempo vintra  
Je noktomeza hor'.

Jesaja ĝin anoncis,  
la mencita Flor';  
Maria ĝin responsis  
el patrin-ama kor'.  
Ŝi naskis Rozon por  
klarigi Dian amon  
Je noktomeza hor'.

Ĉi tiu milda Floro  
per sia dolĉ-arom'  
Heligas per Digloro  
la vojon de la hom'.  
Ja homo, tamen Di',  
ĝi ŝarĝojn malpezigas  
Kaj homojn savas ĝi.

N. N. 32,  
Elkreskis roz-  
branĉeto

*tradukita de Joachim Gießner*

1. Elkreskis rozbranĉeto  
el rozarbust' de Di'.  
Aŭguro de profeto  
rakontis jam pri ĝi.  
Naskiĝis rozfloret'  
meze en vintra nokto  
laŭ diro de profet'.

2. Ja naskis tiu rozo -  
Jesaj' prognozis ĝin -  
el sia korpo sproson  
Mari' la virgulin'.  
Laŭ dipotenca vol'  
ŝi naskis Di-infanon  
por tutu mond' konsol'.

3. Kaj tiu belfloreto  
tre hele lumas ĝi.  
Obskuron la brileto  
forprenas nun de ni.  
Vi hom' kaj vera Di'  
el pekoj kaj suferoj  
estas savant' por ni.

...

...

...

Traduko de la Germana poemo “Es ist ein Ros entsprungen” de N. N. 32 en la Danan de Thomas Laub.

Arg-618-1249 (2012-10-19 19:29:42)

Tiu ĉi danigo de la kanto troviĝas en <http://ingebo.org/spiritua/esistein.html>. Vidu ankaŭ: [http://da.wikisource.org/wiki/En\\_rose\\_s%C3%A5\\_jeg\\_skyde\\_kaj](http://da.wikisource.org/wiki/En_rose_s%C3%A5_jeg_skyde_kaj) [http://www.ugle.dk/en\\_rose\\_saa\\_jeg\\_skyde.html](http://www.ugle.dk/en_rose_saa_jeg_skyde.html). Pri Thomas Laub vidu la retejn [http://de.wikipedia.org/wiki/Thomas\\_Laub](http://de.wikipedia.org/wiki/Thomas_Laub).

Traduko de la Germana poemo “Es ist ein Ros entsprungen” de N. N. 32 en Esperanton de LE LAND BRYANT ROSS (*Ros’ Ha-ruo*).

Arg-618-1247 (2014-09-08 13:06:28)

Tiu ĉi traduko troviĝas en <http://www.reocities.com/cigneto/thctxt/j/jencxiamv1.html>. Pluaj tradukoj de la sama aŭtoro troviĝas sub [http://www.reocities.com/cigneto/thcbio/r/ros\\_h.html](http://www.reocities.com/cigneto/thcbio/r/ros_h.html). Pri la tradukinto vidu la facebook-paĝon <https://www.facebook.com/leland.ross/photos>.

Traduko de la Germana poemo “Es ist ein Ros entsprungen” de N. N. 32 en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (\*1913-12-23 – †2003-11-25).

Arg-618-1244 (2012-10-18 21:24:22)

Tiu ĉi poem-traduko troviĝas en <http://www.esperanto.de/kantoj/index-giessner.html>. Sub <http://www.esperanto.de/kantoj/kantoj.pdf>.